Aruŝo lundon, la 5-an de aŭgusto 2024 numero **3**

# La Voĉo de Kilimanĝaro

Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto

## La kongreso de virinoj

La dua kongreso de esperantistaj virinoj AKVO, kiu okazis en Aruŝo de la 31-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2024, kunvenigis ĉ. 60 partoprenantojn el Belgio, Burundo, Ĉinio, Francio, Gambio, Kenjo, RDK Kongo, Koreio, Madagaskaro, Svislando, Tanzanio kaj Usono. Tiu ĉi aranĝo, kiu reliefigis la decidan rolon de virinoj en la Esperanto-movado, estis vera festo de virina engaĝiĝo kaj solidareco ene de la E-komunumo.
Sub la temo *Virinoj: leviloj de daŭrigebla disvolviĝo*, la partoprenantoj havis la ŝancon interŝanĝi ideojn kaj perspektivojn pri la graveco de Esperanto kiel ilo por egaleco kaj interkultura interkompreniĝo. La intervenoj de prelegantoj, el diversaj profesiaj kaj kulturaj fonoj, traktis diversajn temojn kiel la instruadon de la lingvo al infanoj, la rolon de virinoj en la disvastigo de Esperanto, la problemojn alfrontitajn de virinoj en la movado kaj la efikon de Esperanto al ina emancipiĝo.
La kongresa programo estis riĉa je praktikaj laborrenkontiĝoj, kiuj iris de artoj ĝis metilernado, ebligante al virinoj enspezigi monon per siaj propraj iniciatoj. Malfermaj diskutoj ankaŭ esploris la malhelpojn alfrontatajn de virinoj kiel lernantoj kaj praktikantoj de Esperanto. Ankaŭ grava temo de la kongreso estis genra egaleco: virinaj rajtoj, virina povo. Inter la eminentaj invititoj de la kongreso estis Duncan Charters, la prezidanto de UEA.
Estis lanĉita ideo por la kreado de internacia reto de esperantistaj virinoj, celante subteni kaj antaŭenigi lokajn iniciatojn samtempe plifortigante la ligojn inter virinoj engaĝiĝintaj en la movado. Tiu ĉi alvoko estis varme bonvenigata de la partoprenantoj, kiuj esprimis sian deziron nutri kontakton kaj kunlabori trans landlimoj.
La kongreso de esperantistaj virinoj estis momento de inspiro kaj plifortigo de ligoj. La partoprenantoj disiĝis pli motivitaj kaj entuziasmaj per novaj ideoj por diskonigi Esperanton ne nur kiel lingvon, sed kiel veran ilon de egaleco kaj emancipiĝo. Dum la esperantista movado daŭre evoluas, la rolo de virinoj ene de ĝi montriĝas pli kaj pli decida ol iam ajn.

**Ranja ZAFINIFOTSY**



## Ekumena Diservo kaj Sankta Meso



Dimanĉe, la 4-an de aŭgusto posttagmeze la katolika katedralo de Aruŝo gastigis Esperantistojn. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista prizorgis tie du eventojn. La Ekumenan Diservon gvidis pastro Gabriel Anda el Kameruno, kaj predikis la pastorino Miora Raveloharison.
Post la Ekumena Diservo okazis la Katolika Meso en Esperanto, kiun celebris pastro Anda. Tio estis la unua fojo ke la Katolika Meso en Esperanto okazis en Tanzanio! Ambaŭ eventojn piane akompanis Perlo Miela el Hungario.
La paroka/katedrala koruso regalis la partoprenantojn de la meso per kelkaj tradiciaj kantoj.
Esperantistojn nome de la loka ĉefepiskopo bonvenigis la paroĥestro de la katedrala paroko. Al ili, IKUE-prezidantino Marija Belošević transdonis la donacojn por la ĉefepiskopo, i.a. la eldonojn de IKUE.

**Marija Belošević**, KN306

## La Kongresa Kuriero pardonpetas

Aperis malĝuste la nomo de la verkinto de la teksto titolita "Antaŭkongresaj raportoj", artikolo kies unua parto aperis en la hieraŭa Kuriero – kio tamen estis ĝisdatigita en la cifereca Kuriero. La ĝusta nomo de la kontribuinto estas **Elizabet Le Dru**, KN 324. Ni pardonpetas pro la eraro.
Ne estis tiel facile senerare tajpi manskribitajn kontribuaĵojn, kiuj venis bildforme por la Kuriero.

## Venu al la kunveno de ATEO!

ATEO estas Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo. Ĉiuj interesatoj kaj scivolemuloj estas invitataj al ĝia kunveno, kies temo estos "Ateismo en Afriko". La kunveno okazos lundon je 10.45 -11.30 en la salono Čeliauskas.

**Anna Lowenstein**




# Salutmesaĝo de Margaret Zaleski-Zamenhof al la 109-a UK

Karaj kaj estimataj kongresanoj, gastigantoj, geamikoj, organizantoj,

Kiel ano de la familio Zamenhof mi fiere salutas vin kaj deziras al ĉiuj riĉan kaj sukcesan kunestadon.
Bedaŭrinde, ĉi-jare, ne eblas por mi fizike ĉeesti nian renkontiĝon. Tamen, mense mi estas kun vi, tial mi ĝoje sendas ĉi tiun mesaĝon.
Dank' al modernaj rimedoj, hodiaŭ eblas esti kune malgraŭ la grandegaj distancoj, malgraŭ diferencoj en horzonoj.
Mirinde estas observi sciencfikciajn revojn realiĝi.
Ni, homaranoj, kapablas atingi niajn revojn, eĉ kiam ili ŝajnas tute fantaziaj.
Kion ni bezonas, por atingi niajn plej eksterordinarajn revojn?
Ni bezonas celon, ni bezonas grandegan deziron sukcesi.
Ni bezonas, ke nia celo estu la plej grava afero en nia vivo. Ni bezonas koncentriĝi kaj uzi nian plenan energion




por ke la revo fariĝu realo.

Se la celo koncernas homaron, planedon, mondon, tute ne efikas agi sole. Ni bezonas intersubtenon, komunan forton kaj motivon. Ni bezonas ke ĉiu partoprenanto de nia enterpreno havu taskon, kiun li emas kaj kapablas plenumi. Ni bezonas kunmeti kaj dividi niajn rimedojn kaj kapablojn. Aparte gravas la divido kiam la kunlaborantoj devenas de diversaj kontinentoj, diversaj sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj medioj. Dum niaj kongresoj ĝuste tion ni strebas fari.

Mia praavo, Doktoro Zamenhof, certe ne sukcesintus sole. Li revis pri paca kaj bela mondo, kie homoj feliĉe kaj sukcese povos kunesti kaj kunlabori pri komunaj aferoj.

La internacia lingvo estas rimedo por kune revi kaj kune konstrui la arde deziratan realon.

Tial la temo de ĉi jara kongreso «Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo" perfekte kongruas kun la spirito nia movado. Ni estas ja «pacaj batalantoj» por pli bona mondo.

Dankon al ĉiuj pro la sindediĉa laboro. Tute apartajn gratulojn al niaj gastigantoj, Afrikaj esperantistoj.

**Margaret Zaleski-Zamenhof**

## La Bela Ĉinio, bela Tanzanio



Kun plurdeka partoprenantaro, en kiu miksiĝis multaj afrikaj, ĉinaj kaj eŭropaj esperantistoj okazis riĉa kunveno 2/8/2024 – 14:45. Ĝi estis riĉa pro la paroladoj de la prezidanto de UEA, de la vic-prezidanto de la Ĉina Komunikila Grupo Yu Tao kaj de pluraj aliaj honoraj gastoj ĉinaj kaj neĉinaj. Chen Ji, la ĝenerala sekretario de ĈEL prezentis filmon pri la agado ĉefe pri instruado de Esperanto dum la lasta jaro, pri aranĝado de esperantistaj kunvenoj kaj tute aparte pri la eldonado de la belega Unesko-kuriero, senpage elŝutebla el la paĝaro de Unesko mem. La plej alta punkto estis la donacoj al la tanzania Esperanto-movado de longega artista desegno pri la silka vojo, de libroj en la svahila kaj de interŝanĝoj de ĝentilaĵoj kun la prezidanto de la Tanzania Asocio pri la intereso en Tanzanio pri Ĉinio.

La sola voĉo ne nur laŭda sed ankaŭ peta estis tiu de la eksa prezidanto de UEA, Renato Corsetti, kiu agnoskinte ke neniu alia landa asocio en la tuta mondo faras tiom da laboro, tamen petas ke ĈEL komencu sian longan marŝon laŭ la silka vojo, alivorte, ke, laŭ la ĝeneralaj gvidlinioj de la ĉina registaro pri la zono kaj la vojo, ĝi helpu la malfortajn movadojn laŭ la azia parto de la silka vojo, kiuj estas ĉiuj malfortegaj aŭ mortintaj. Nur ĉinaj esperantistoj povas fari tiun grandan servon al Esperanto.

**Renato Corsetti**

## La koloroj de la flago de Tanzanio



La koloroj de la flago de Tanzanio havas plurajn signifojn:

- la verda estas koloro de natura vegetaĵo kaj riĉaj agrikulturaj rimedoj de la lando;
- la nigra signifas denaskan popolon;
- la helblua aludas la oceanon, lagojn kaj riverojn;
- la orflava koloro simbolas la stokojn de mineraloj de la lando.

## Salutparolo nome de ILEI

Saluton al ĉiuj!

Mi ne membras en la Estraro de ILEI. Mi estis prezidanto de ILEI dum ok jaroj. Nun ne plu. Mi ĝojas anonci al vi nun, ke estas nova kapabla Estrarano de ILEI el Afriko, Patrick Manirakiza sekciestro de Burundo kaj kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, kiu zorgos precipe pri Afrika Agado. Sed la Estraro de ILEI daŭre petis, ke mi reprezentu la Ligon ĉi tie por substreki la kontinuecon de la Agado de ILEI por Afriko tra la jaroj.

Mi ne membras en la Estraro de ILEI. Mi estis prezidanto de ILEI dum ok jaroj. Nun ne plu. Pro la fakto, ke neniu membro de la Estraro de ILEI povis esti ĉi tie, tiu Estraro donis al mi la taskon saluti vin.
Nelson Mandela diris: "La plej potenca armilo por ŝanĝi la mondon estas EDUKADO".
Afrika Unio deklaris la jaron 2024 JARO DE EDUKADO.

La unua tanzania prezidento Julius Kambarage Nyerere tre atenteme zorgis pri la enhavo de la instruprogramoj en la lernejoj. Li subtenis la lokajn lingvojn, abunde disvastigis la uzon de la svahila lingvo. Li organizis, ke infanoj en la lernejoj malkovru novajn agrikulturajn metodojn, kaj tiuj infanoj alportis tiujn novajn farmanierojn al siaj familioj. Tiel agrikulturo bone evoluis. Li provis kunmeti disajn vilaĝojn por konstrui en ĉiu el ili lernejon kaj sanservon. Li estis la unua ŝtatestro, kiu aperis en Unuiĝintaj Nacioj surhavante afrikstilajn vestaĵojn. Li estis fiera afrikano, saĝa kaj efika. La nuna mondo bezonas tiajn ŝtatestrojn.

Nun aperas antaŭ ni multaj defioj. Ni ĉerpu informojn kaj kuraĝon, ni trovu inspiron ĉe tiuj afrikaj eminentuloj, lumturoj por la tuta homaro. Ni plej zorgeme atentu pri adekvata instruado en ĉiuj eblaj lokoj, kie ni havas tiun noblan taskon.

ILEI eldonis lernolibron pri E-o en la svahila de Nino Vessella, kaj nun tute novan lernolibron de Joël Muhire kune kun John Magessa. Ĵus aperis nova lernolibro en la svahila en Kroatio, per la kontribuo de fama burundano Eric Nsabiyumva. Plie vi havos dum la Kongreso la eblon perfektigi viajn instrukapablojn partoprenante kurson sub la gvido de Doktorino Miora Ravaloharison. Vortaroj kaj lernolibroj kune kun abunda literaturo troviĝas en la Libroservo je via dispono.

Mi finas, menciante afrikajn proverbojn:
*Sidanta maljunulo vidas pli for ol staranta junulo.*
*Mortanta maljunulo similas al brulanta biblioteko.*
*Paŝu en la spuroj de via patro kaj ĉio iros glate por vi.* Tiu ĉi proverbo ŝajnas al mi bremsa: kion faru genia infano? Ĉu tiu brila infano restu malantaŭ sia patro? Bonvolu pripensi!
Mi deziras al vi fruktodonan pripensadon kaj agrablan kongreson!

**Mireille Grosjean**